


La Kastelo Herzberg kaj la Welf-familio

Kvankam la memortabulo sur la enirejo de la kastelo mencias la jaron 1023 kiel konstrujaron de la kastelo - origine konstruita kiel ĉasdomo - kaj kvankam la hercberganoj celebris en la jaro 1929 la 900-jaran jubileodaton, la historia vero estas, ke nur el la jaro 1154 devenas la unua dokumentita mencio.



En tiu dokumento (la originalo troviĝas en la dekretaro de la monaĥejo Volkenroda) la duko Henriko la Leono atestas al la monaĥejo Volkenroda la posedrajton, kiun li ricevis de siaj gepatroj. Unu el la atestantoj estis iu Luipoldus de Hirzesberc.

En tiu kunteksto estas menciita la evoluo de la nomo de la kastelo kaj ĝia lingva signifo. De Hircesberc (1154), Hierzesberc kaj Hertisberc (1156), Hirzesberch (1157), Hirzesberc (1188), Hertsberg (1218), Hertsbergk (1360), Hirssberg (1461), Hertsberge (1502) ĝis la hodiaŭa skribmaniero Herzberg. La signifo de la mezpoka “hirz” estas cervo. (Pro tio estus pli ĝuste esperantigi la nomon Herzberg kiel “Cervomonto” kaj ne kiel “Koromonto”.) La menciita dekreto kaj

aliaj, kiujn Henriko la Leono donis, montras lian altrangan pozicion en la tiama Sankta Romia Imperio.

La Welf-oj estas unu el la plej malnovaj germanaj aristokrataj linioj kaj radikas en la franka gento. Ekzistas “historio de la Welf-oj” skribita en la jaro 1170 de iu nekonata ŝvaba klerulo. Fiere la aŭtoro raportas pri la deveno de la frankoj de trojanoj, kiuj enmigris post la falo de Trojo kaj setlis ĉe rivero Rejno. (Tio estas tre grava, ĉar per tiu legendo la frankoj volis montri sian samrangecon kun la romianoj, kiuj asertas la saman.)

Kiel prapatron de la Welf-oj oni agnoskas en nia tempo iun grafon Ruthar, kiu vivis en la dua duono de la oka jarcento dum la regado de Pippin, la unua karolinga reĝo. Tiu Ruthar apartenis a la plej alta aristokrataro de la franka imperio. Unu el liaj posteuloj estis iu grafo Welf, la unua posedanto de la nomo. Sed nur en la dekdua jarcento tiu nomo fariĝis nomo por la nobela familio.

En la bataloj inter Ludoviko la Ĝermano kaj la okcidentfranka reĝo Karlo la Kalvulo - Welf helpis Karlon. Pro tio ili perdis la rolon, kiun ili ludis ĝis tiam en la orientfranka imperio.

Sed iom post iom ili ankaŭ sukcesis regajni sian influon en la orientfranka imperio kaj iĝis ŝvaboj. Per geedziĝoj kaj politika oportuno la Welf-oj sukcesis ricevi la dukacon de Bavario kaj Saksio, kaj tiel komenciĝis ilia pli ol sepcent jara regado ankaŭ de Herzberg.



Menciinda fakto estas la dekreto de imperiestro Frederiko la Unua - Ruĝbarbulo (Friedrich I. Barbarossa). En la 1-a de januaro 1158 la imperiestro atestas, ke Henriko la Leono, kuzo de la imperiestro, ricevis kelkajn jarojn antaŭe la burĝon Scharzfels kaj la palatinaton (Pfalz) Pöhle kaj ties ĉirkaŭaĵon kadre de iu bieninterŝanĝo de la imperiestro.

Poste Henriko la Leono kelktempe perdis Herzberg-on, sed regajnis ĝin kaj poste ili kapitulaciis favore al la imperiestro. La Welf-oj eĉ gajnis la kronon de la Sankta Romia Imperio sub Otto la Kvara en la jaro 1198.



En la jaro 1714 la Welf-oj eĉ gajnis la kronon de Granda Britio. La unua Welf-reĝo sur la brita trono estis Georgo la Unua, filo de Sofio el Palatinato (Sophie von der Pfalz), kiu estis nepino de la stuarta reĝo Jakobo la Unua, kaj la princo de Hanovro Ernesto Aŭgusto (Kurfürst Ernst August). Georgo la Dua (Georg II) sekvis sian patron en la jaro 1727 sur la britan tronon. Li naskiĝis en la kastelo Herzberg am Harz. Ofte li vizitis sian naskiĝurbon Herzberg am Harz kaj ĝuis ĉi tie ekzemple la grandan pelĉasadon la 24-an de julio 1729.

En 1866 Prusio atakis kaj konkeris la reĝlandon Hanovro kaj ĝi fariĝis parto de Prusio. Veraj anoj de la Welf-familio bedaŭras tion.



La ĉevalo en la blazono de Malsupra Saksio devenas el la dekkvara jarcento, kiam la blanka ĉevalo sur ruĝa grundo iĝis parto de la blazono de Welf-oj. La motivo por preni la ĉevalon - apud la leono - kiel blazonbeston estas la fakto, ke la estroj de la antikvaj saksoj jam uzis la ĉevalon de Saksio (Sachsenross) kiel blazonbeston.

(Redaktis: Zsófia Kóródy)